

MANIFESTO DE PLANET DIVERSITY (PLANEDO DIVERSECO)

Ni homoj de Planedo Diverseco kunvenas por celebri la riĉan biologian kaj kulturan diversecon, kiu estas nia heredaĵo, kaj por konfirmi nian devontigon pludoni ĉi heredaĵon en sia tuteco al la futuraj generacioj.

Ni rifuzas la malesperon de mondo, fokusita al konsumo kaj konkurenco, kaj ni asertas, ke ni ne akceptas malfidon, avidon, perforton kaj timon kiel manierojn rilati inter ni aŭ al aliaj vivestaĵoj. Ni kredas, ke alia mondo eblas, mondo, bazita sur paco kaj justeco kaj ekonomiaj oportunoj por ĉiuj.

Ni estimas ĉiujn regionojn kaj ekosistemojn, kaj aparte altvalorigas tiujn centrojn de origino, kiuj estas la fonto de diverseco, sur kiu tiom multe de niaj vivoj dependas.

Ni alte taksas la surlokecon kaj la regionigon, ne la tutmondiĝon, ni serĉas la egalecon kaj reciprokecon, ne la dominadon pri aliaj.

Ni komprenas nin kiel parton de la naturo, ne kiel mastroj super ĝi.

Ni apogas la saĝecon, kiu ligas antaŭzorgemon al la serĉado pri konoj. Ni vidas, ke antaŭzorgemo estas necesa por preventadi damaĝojn al ĉiuj, kiujn ni amas kaj estimas kaj servas kaj emas kompreni; kaj ni scias, ke kiu ajn arogante forĵetas la principon de antaŭzorgemo, riskas la treajn bazojn de la vivo sur la Tero.

Ni serĉas mondon de bona sano kaj de efikaj, sekuraj kaj akireblaj nutraĵoj por ĉiuj.

Kaj ni senhonte respektigas la belon kaj interrilatadon de ĉiu biodiverseco.

Se temas pri diverseco de nia propra specio, ni ĉiuj ĝin celebras, sed ni aparte estimas pri

- * la savuloj de semoj kaj la konservuloj de tradiciaj konoj,
- * la semuloj kaj kolektuloj de sanaj rikoltoj kaj la preparuloj kaj manĝuloj de aŭtentaj nutraĵoj (slow food),
- * la malgrandaj bienistoj, farmistoj, kamparuloj, kiuj manĝigas kaj vivtenas nin,
- * la aktivuloj, kiuj postulas respondecon, travideblecon kaj publikan partoprenadon,
- * la artistoj kaj poetoj, kiuj iqas nin malfermi la okulojn kaj korojn,
- * la paciguloj, kiuj pelas nin al reciproka respekto kaj bonfarto,
- * la sciencistoj, kiuj instruas nin agadi en kunlaboro kun la naturo kaj inter ni,
- * la kleruloj, kiuj memorigas nin pri tio, kiel ni estos juĝataj en la futuro.

Fine ni celebras tiujn, kun kiuj ni ne interkonsentas, ĉar ili estas kiuj pelas nin, kiel ni pelas ilin, al pli larĝa saĝeco.

Per granda respekto ni ĉirkaŭbrakumas ilin ĉiujn kaj ni agnoskas, ke ni ĉiuj, vere ĉiuj, estas la bonŝancaj prauloj de ĉi tiu nia kune havata hejmo, la Planedo Diverseco.

PLANET DIVERSITY (PLANEDO DIVERSECO) estas la nomo de

- * la Monda Kongreso pri la Futuro de Nutraĵoj kaj Agrikulturo (Ĉijare en Bonn, FRG). Ĉeftemo estis la antaŭenigo de responseca juro kaj ĉirilataj internacie validaj leĝoj kaj reguloj koncerne genteknike ŝanĝitaj organismoj kadre la konferencon de la intertraktataj ŝtatoj de la Protokolo pri Biologia Sekureco (Kartageno, Kolombio, 2003)
- * la internacia reto de iniciatoroj, movadoj kaj institucioj, kiuj kunlaboras por la konservado de biologa, kultura kaj ekonomia diverseco. En ĝi estas alstrebata interkonsentoj pri komunaj celoj kaj strategioj, kaj la formulado de komuna memidenteco.

(prizorgis W. Guenther, EKOMED, AP 270 - C/Esperanto, 3, 03170 Rojasles, Hispanio, retpoŝto: w.guenther.esperanto@web.de)